

# Esperanto en Skotlando

*Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba*  
*Vintro 2007/2008 - £2/€3*



## John Francis: *La Romanco de Klingo Kulter*

Ankaŭ en ĉi tiu numero: David Kelso : “Kia nia komunumo” : Mira Makivić : “Pri Respubliko Srpska” : Ed Robertson : “When to use the accusative in Esperanto” : Alekso Mollison : “Kristnasko je la Krucvojo” : Poezio de Joe Corrie, Hju Rid, kaj William Soutar : KAJ MULTO ALIA .....

# Esperanto en Skotlando

Numero 196 – Vintro 2007/2008 – ISSN 0014-0643

**Redaktoro:** Ed Robertson  
**Helpredaktoro:** David Kelso  
**Administranto:** Mia Casey  
**Lingva konsilanto:** Tom Neil

**Redakcia adreso:** 52 Easter Drylaw  
View, Edinburgh, EH4 2QP  
**Telefono:** 0131 332 9803  
**Rete:** ed-robertson@teleosvet.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuantojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de *Esperanto en Skotlando*: 14a de februaro 2008. Oni prefere sendu kontribuantojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer (senpage havebla de la koncerna retejo). Dokumentoj en la formato Microsoft Word ankaŭ estos akceptataj. *Esperanto en Skotlando* uzas la tiparon Gentium, kiu subtenas kaj la tradiciajn esperantajn diakritojn kaj tiujn de ĉiu alia latinalfabeta skribsistemo (vizitu <http://scripts.sil.org/Gentium> por deŝuti la tiparon). Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj. *Esperanto en Skotlando* aperas dufoje en la jaro.

## Enhavo

David Kelso: Kia nia komunumo .....	6
Girvan McKay: Joe Corrie – Poeto de la popolo .....	9
Andrew Weir: Raporto pri Jokohama .....	11
Ed Robertson: When to use the accusative in Esperanto .....	17
John Francis: La Romanco de Klingo Kulter .....	26
David Kelso: Diversaj opinioj .....	29
Mira Makivić: Pri Respubliko Srpska .....	29
Girvan McKay: La persisto de la junaj viroj (William Soutar) .....	31
Hju Rid: Ponte San Niccolo .....	32
Xiaofeng Gong: Neforgesebla Skotlanda Esperanto-Kongreso .....	36
LA 103a SKOTLANDA KONGRESO DE ESPERANTO / ALIĜILO .....	39
Alekso Mollison: Kristnasko je la Krucvojo .....	41

La opinioj esprimitaj en *Esperanto en Skotlando* ne nepre kongruas kun tiuj de *Esperanto en Skotlando* aŭ EAS. *Esperanto en Skotlando* estas publikaĵo de la

## Esperanto-Asocio de Skotlando

**Prezidanto:** David Hannah  
**Vic-Prezidanto:** Andrew Weir  
**Sekretario:** David Bisset  
**Kasisto:** David Hannah

**Adreso:** 47 Airbles Crescent,  
Motherwell, ML1 3AP.  
**Telefono:** 01698 263 199  
**Rete:** [secretary@skotlando.org](mailto:secretary@skotlando.org)

# El katedro



Redaktora Komento

Veni, vidi, venki?

La sendependa MSP Margo MacDonald lastatempe pledis denove por la revenigo de la latina lingvo reen en la klasĉambrojn de Skotlando. Ŝi diris “*La nuntempaj normoj pri gramatiko estas teruraj. La BBC diris ĉi-matene ke la nuboj pliiĝas. Tamen, nuboj ne pliiĝas. ... Mi scias ke tio igas min soni kiel S-ino Pernickety (harfenda) de The Grange (burĝa kvartalo en Edinburgo) de ĉirkaŭ 1958, sed iu devas alfronti ĉi tion*”. Nu, mi ne kontraŭas la propedeŭtikan valoron de latino, kaj mi mem ĝuis la bonojn de klasika edukado, kvankam en la latina klaso mi iomete pli interesiĝis pri la knabino malantaŭ mi, sed tio estas alia afero. Persone, mi ne vidas problemon pri “*la nuboj pliiĝas*”, kaj mi dubas ĉu la Romianoj malakceptus *nubes multiplicantur*. Ja ĝenas al mi la misuzado de ofteĝaj vortoj kiel ekzemple *criterion / criteria* kaj *phenomenon / phenomena* ĉe multaj nuntempaj parolantoj de la angla. Tio, tamen, estus argumento por la reenkonduko de la antikva helena lingvo. Kiel historia lingvisto, mi, post kelkaj glasoj da likvaĵo, pasintece eĉ sugestis, ke oni enkonduku en la lernejojn ne nur tiujn du antikvajn lingvojn, sed ankaŭ eble la hetitan aŭ sanskriton. Mi nur duonŝercis.

Interesis al mi do aŭdi, ke lastatempe iu volas atuti la karan parlamentaninon rilate antikvecon, kaj proponis la pra-hindeŭropan lingvon (de antaŭ pli ol 5000 jaroj), ne nur kiel studobjekton, sed ankaŭ kiel internacian helplingvon! (Specimeno: *tod kékluoos, h<sub>3</sub>ouis h<sub>2</sub>égrom b<sup>h</sup>ugét - “tion aŭdinte, la ŝafo fuĝis al la ebenejo”*; pluaj detaloj estas ĉe <http://dnghu.com>). Tamen, oni devas fari linion ie, kaj tio vere estus tro. Ne nur supersignaĉoj, sed ankaŭ subsignaĉoj! Serioze, tamen: post jarcentoj da argumentado, lingvistoj ne estas multe pli proksimaj al interkonsentita versio de ĝi: kiom da kazoj, kiom da deklinacioj, se ne paroli pri kiom da signifoj por la sama vorto. Tamen, kio pleje forpuŝis min pri la propono estis ĝia menciita celo defendi la eŭropan kulturon. Mia pozicio pri tio estas tiu de Gandhi: kiam brita ĵurnalisto demandis al li, kion li pensas pri kulturo en la okcidento, li respondis ke jes, estus bona ideo, se ili havus. Pli bone tutmonda lingvo kun tutmonda etoso: Esperanto.

Ed ROBERTSON

# Abonilo

## ESPERANTO-ASOCIO DE SKOTLANDO (EAS)

### Kotizo al EAS / abono al “Esperanto en Skotlando” por 2008:

Dankon pro via ĝisnuna fidela subteno. La jarabono komenciĝas en januaro ĉiujare. Plene pagitaj membroj de EAS ricevas “Esperanto en Skotlando” kaj la “Scottish Esperanto Bulletin” senpage.

Sendu al: Membreca Sekretariino S-ino M. Casey, 9 Flora Gardens, Bishopbriggs, Glasgow, G64 1DS



### Elektu kaj indiku la kategorion

Kotizo al EAS kaj senpage ricevo de la gazetoj	£7.50/€10.50
Ne-membro en Britio kiu abonas nur al EeS	£5/€7
Ne-membro en alia lando	£7.50/€10.50
Ekstra jarabono de <b>EeS</b> al la sama adreso	£4/€5.50

Donaco al Esperanto-Asocio de Skotlando

£/€

Totala sumo

£/€

Nomo .....

Adreso .....

Poŝtkodo .....

Telefono .....

Resendu ĉi tiun folion (aŭ kopion), kune kun via pago. Se pagante per £ pagu ĉeke al la adreso sube; ekzistantaj abonantoj kiuj ne havas adresŝanĝon povas simple sendi la ĉekon – ne necesas replenigi la formularon. Ĉekoj estas pagendaj al: “Scottish Esperanto Association”. Se pagante per €, vi povas pagi kontantan monon (ne ĉekojn) rekte al la adreso sube, aŭ alternative vi povas pagi en nian UEA-konton **eask-l** kaj sendi al ni la formularon, indikante ke vi jam pagis en nian UEA-konton. Bv. noti ke kvitancoj ne sendiĝos ĝis la sekvanta numero de **Esperanto en Skotlando** eldoniĝas.

# Kalendaro



- 
18. - 20. **januaro 2008**: Ni Festivalu, Barlastono. Info: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE. Tel.: 01782-372141, rete: [eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org)
- 
11. - 15. **februaro 2008**: 5-a Azia Kongreso de Esperanto en Bengaluro, Barato. Info: Kongresa kunordiganto: d-ro P. V. Ranganayakulu, tel.: +91-94409 43542, rete: [ranganayakulu@gmail.com](mailto:ranganayakulu@gmail.com)
- 
19. - 25. **marto 2008**: 32-a IJF (Internacia Junulara Festivalo) en Senigallia, centra Italio. La temo estas "2008 internacia jaro de la lingvoj: defioj kaj perspektivoj". Info: Nicola Ruggiero [ijf.admin@esperanto.it](mailto:ijf.admin@esperanto.it)
- 
4. - 6. **aprilo 2008**: 37-a Studsesio por klerigado (faka klerigseminario) che ICH/Herzberg. Info: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr. 6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)
- 
9. - 11. **majo 2008**: Brita Kongreso de Esperanto en Southport, Britio. Vizitu la ĉarman britan banurbon proksiman al Liverpoolo, europa kulturb-urbo 2008. Info: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, ST12 9DE: Tel: 01782-372141 rete: [eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org)
- 
6. - 9. **junio 2008**: 103-a Skota Kongreso de Esperanto en Invershin Hotel, Invershin, Sutherland, Skotlando. Pluaj informoj sur paĝoj 39-40 de ĉi tiu numero de *E en S*.
- 
10. - 18. **junio 2008**: 30a Ĉealbta Esperantista Printempo en Mielno, 12 km de Koszalin. Jubilea ĈEP kun riĉa kaj varia E-programo. (PL). Info: Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, poŝtkesto 30, PL-75-016 Koszalin-1, Pollando. ĈEP-organizanto: Czesław Baranowski Telefono: +48(0)503-417-825.
- 
11. - 18. **julio 2008**: UK-Antaŭkongreso en Herzberg - la Esperanto-urbo. Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)
- 
19. - 26. **julio 2008**: 93-a Universala Kongreso de Esperanto, UK-2008, en Rotterdam, Nederlando. Info: UEA, Nieuwe Binnenweg 193, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +31-10-4361044, rete: [info@uea.org](mailto:info@uea.org)
- 
26. **julio - 2. aŭgusto 2008**: IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Szombathely, Hungario. Info: LKK de IJK 2008, HU-1675 Budapest, Pf. 87, tel./fakso: +36-1-2828885, rete: [hej@eszperanto.hu](mailto:hej@eszperanto.hu) (notu la vorton "eszperanto" ĉe la retadreso)
- 
9. - 15. **aŭgusto 2008**: Somera Festivalo - Kunludu kaj kunstudu en Barlastono. 3-nivela kursaro kun eblo turismi. Info: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE. Tel.: 01782-372141, rete: [eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org)
- 
9. - 16. **aŭgusto 2008**: La 81-a SAT-kongreso okazos en la bulgara urbo Kazanlak (Roza Valo). Info: [www.satesperanto.org/KONGRESO-2008.html](http://www.satesperanto.org/KONGRESO-2008.html)
- 
22. - 29. **aŭgusto 2008**: 75a Itala Kongreso de Esperanto, Grosseto, Toskanio, Italio. Info: FEI, Via Villorosi 38, IT-20143 Milano. Tel: 02/58100857, rete: [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it)
- 
- septembro 2008**: Skota Aŭtuna Studrondo, Churches House, Dunblane. Detaloj anoncotaj. Info: [secretary@skotlando.org](mailto:secretary@skotlando.org) aŭ 01698 263199 aŭ 01698 336366.
- 

POR MULTE PLI PLENA KALENDARO DE EVENTOJ, KROZU AL

<http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

# Kia nia komunumo ?

Legantoj kiuj ĉeestis la studrondon en Dunblane, oktobron 2006, eble rememoras (kaj eble ne!) kunsidon kiam ni esploris la ideon *Kia nia komunumo?*, t.e. la Esperanto-komunumo. Plurajn monatojn antaŭe, Hju Rid invitis min gvidi unu sesion de la semajnfino. Mi decidis ke, anstataŭ eĉ pluan prelegon, ni faru *fokusgrupon* (anglalingve, *focus group*, ege ŝatata de la nuna [nov]laborista partio). Mi volis kunesplori kiel aspektas al ni mem nia mondeto kaj kiel ni deziras ke ĝi aspektu .....

Ni komencis per difini tiun nian mondeton. Ĉefe, ĝi estas homoj: aktivuloj, membroj, subtenantoj, abonantoj, ajnaj uzantoj de la lingvo, esperantaj familioj, ..... eĉ eksmembroj, kvazaŭsubtenantoj! Ni interkonsentis (tute nescience) ke plej kredeble estas pli-malpli 100 mil vere *aktivaj* esperantanoj en la mondo, sed pli ol miliono da homoj kiuj scipovas, uzas, uzis, lernas, iam lernis, aŭ konscie subtenas la internacian lingvon. Povas esti ĝis 300 esperantaj familioj en la mondo. Nia komunumo troviĝas iaforme en pli ol 100 landoj. Ni esperantanoj kunvenas ĉiujare en dekoj da kongresoj kaj konferencoj, el kiuj eble 10-20 estas vere *internaciaj*.

Organizoj estas la plej videbla aspekto de nia komunumo, kvankam eblas ke nur malplimulto el esperantanoj membras en ili. En la mondo povus esti pli ol mil lokaj grupoj, kluboj, societoj; eble 100 fakaj organizoj, kaj landaj kaj tutmondaj. Post homoj kaj organizoj, eble la plej grava elemento en la Esperanto-komunumo estas eldonaĵoj: libroj, gazetoj, revuoj - kaj hodiaŭ, retpaĝoj, retlibroj, retgrupoj, sen mencii la monumentan Vikipedion. Ni taksis ke je iu momento ekzistas en la mondo ĉ. 100 esperantaj gazetoj, ĉ. 10 eldonejoj, miloj da retpaĝoj. Kiu scias kiom da esperantaj libroj eldoniĝis dum la pasintaj 120 jaroj? - eble 25 mil? Estas (ni diru) 5 grandaj esperantaj bibliotekoj en la mondo (enhavantaj po 5-15 mil librojn) sed ja centoj da malgrandaj en kluboj, oficejoj kaj privataj domoj.

Jen nia mondo, nia Esperanto-komunumo, pli-malpli: vasta, bunta, viva, mondskala, multfaceta, ŝanĝiĝanta ..... Sed kiuj aspektoj gravas, plaĉas, mankas, allogas, fortas, malfortas? Post bildigi nian mondeton, ni konsideris (unuope) *Kio allogis min al Esperanto?* El tiom da karakterizoj, kiuj ja fakte instigis nin lerni kaj uzi la lingvon - kaj resti esperantano? La respondo estis tre, tre klara. Ne estis libroj, filmoj, bibliotekoj kiuj allogis

nin - sed homoj. Evidentis ke la ĉefa allogilo por ni estis esperantanoj mem (iu emfazis, ge-esperantanoj!). En Esperantio - kluboj, kongresoj, fakaj organizoj, retgrupoj k.c. - estas multegaj okazoj por trovi amikojn (geamikojn!), ĉu lokajn, ĉu leterajn/ retajn. Kaj ne nur ajnajn amikojn, sed vere simpatiajn, homojn kiuj kunhavas niajn valorojn, niajn kredojn.

Post la esperantanaro, oni menciis la lingvon mem: por multaj, la lingvo Esperanto estas intelekto kaj arte tre plaĉa. Pli ol en (nedenaska) nacia lingvo, oni povas ja majstri la internacian lingvon, priludi ĝin, inventi, vortludi, originale kaj verve esprimi sin. Ne estas nur kroma lingvo, Esperanto: estas aparte alloga, plaĉa lingvo, precipe por lingvo-amantoj. Kaj por multaj kiuj ne aparte lertas pri lingvoj, ĝi estas vere lernebla !

Oni menciis aliajn aspektojn de la Esperanto-komunumo kiuj gravas por allogi kaj teni nin: la eblon vojaĝi per Esperanto; esplori tute aliajn kulturojn (ne nur kiel turisto sed kiel vizitanto); renkonti variajn specojn de homo - dum la *Malvarma Milito*, homojn de malantaŭ la t.n. *fera kurteno*, kaj eĉ hodiaŭ homojn el la tria mondo, islamanojn, ateistojn, pacamantojn, anarkistojn, *krudmanĝantojn*, mondfederistojn ..... tutan ĉielarkon da homtipoj !

Ĉu embarasa ke oni apenaŭ menciis literaturon? Sed ne mankas literaturo, ĉu, en niaj nacilingvaj kulturoj? ĉu iu aliĝis al la Esperanto-komunumo por ekhavi literaturon? Verŝajne ne. Jam eniĝinte en tiun mondeton, jes ja ni ĝuas la literaturon (en plej vasta senco) sed tio estas grava faktoro por teni uzantojn, pli ol por allogi lernontojn.

Jen do la ĉefaj *virtoj* de Esperanto, kio allogis kaj retenis nin. Sed la malaj aspektoj? Kio pri la mankoj en nia kulturo? La plimulto de la opinioj esprimataj temis pri la praktika aspekto: mankas propagandistoj, komerca uzado, organizado, socia kaj politika agado, informo. Interese. Ni laŭdas, ni alte valoras la homan, la interhoman aspekton de nia kulturo sed ni konscias la malforton en la praktika, komerca, politika sfero. Malfacilas kontraŭargumenti tiun vidpunkton. Kongruas, ĉu ne, kun nia fakta sperto de Esperantio? Ni estas preskaŭ *malkomerc*; en la komerca mondo, abundas organizado, propagandado, politika engaĝo, sed mankas homeco, amikeco, altruismo ..... Eĉ en la eklezioj, en la bonfaraj organizoj, estas iuj kiuj interesiĝas pri la praktika aspekto. Jes, kompreneble, ankaŭ inter ni - sed malmulte! Ni estas pli idealismaj ol la sanktuloj, pli altruismaj ol la bonfaruloj! Kien do, kion fari, kiel antaŭen ?

Je la fino de nia *kunpensado*, nia *fokusgrupo*, ni konsideris kiel oni plibonigu la Esperanto-komunumon, nian mondeton. Kiel dum la tuta procedo, ĉiu devis private, unuope esplori la demandon antaŭ ol paroli kaj interŝanĝi ideojn. Estis du fokusoĵoj de pensado. Unu estis ke ni devas pli partopreni la eksteran mondon, per pli uzi Esperanton en la lernejoj, per reklamado/varbado, per praktikaj aplikoj de Esperanto en komerco kaj turismo, per politika agado. Nu, tion ni aŭdis aliloke, aliokaze, ĉu ne? Tamen la dua fokuso estis alia, kaj interesa: ni montru al la mondo la efikecon de Esperanto per praktiki ĝin. Ni pliriĉigu nian propran mondeton, ni profitu la praktikan valoron de Esperanto per uzi ĝin, praktike uzi ĝin, inter ni. Iu eĉ proponis "Insulo Esperanto" kie videblas ke eblas multgenta, multlingva, multkultura mondo, pere de Esperanto. Nu, la insulo povus esti *virtuala insulo*, ne geografia, sed **Kial ne?** Jam ekzistas esperantaj insuletoj - Roterdamo, La Chaux-de-Fonds / La Civito, Grezijono, Kvinpetalo kaj aliaj. Kial ne kunigi tiujn en unu loko - ĉu Grezijono, ĉu Slovenio - por krei veran *Esperantion* kie oni uzu la internacian lingvon ĉiutage, ĉiucele, kaj tiel montri al la cetera mondo ke eblas pli bona, pli inkluziva, pli kunviva mondo?

Surprize klara konkludo, laŭ mi, al tute nescienca, ne zorge planita, procedo. Ni ja estas idealistoj; por ni la plej grava ero estas niaj kunesperantanoj; mankas ĉefe praktikaj aplikoj de Esperanto; ni do pritraktu la mankon pere de nia forto - ene de la Esperanto-komunumo mem. Kial ne ?

David KELSO

---

## TRADUKOJ DE LA ĈEFVERKO DE AULD

EVA, La Esperantlingva Verkista Asocio omaĝas la memoron de William Auld per reta publikigado de kreskanta nombro da nacilingvaj tradukoj de liaj verkoj. De lia ĉefverko, la 25-ĉapitra poemo *La infana raso* jam videblas sur la retpaĝoj de EVA versioj nederlanda, portugala, franca, itala, ukraina, angla, skota kaj (lastatempe) skotgaela. Baldaŭ aperos hungarlingva versio farita de István Ertl, kiu redaktis la anglan version de Girvan McKay, tradukinto ankaŭ de la skota kaj gaela versioj. La nacilingvaj tradukoj legeblas vizitante la EVA-retejon. Por trovi ĝin, simple tajpu la vortojn "Esperantlingva Verkista Asocio" sur la serĉilo Google.

G.McK.



# Joe Corrie – Poeto de la popolo

Iu ajn kiu decidus entrepreni la taskon kompili pli-malpli kompletan liston de niaj skotaj poetoj , konstatus, ke ĝi ampleksus homojn el ĉiu tavolo de la socio: lordojn kaj lordinojn, humilajn laboristojn, hubulojn\*, instruistojn kaj klerikojn ... finfine, personojn de ĉiuj klasoj kaj tipoj, verkante en la tri\*\* lingvoj parolataj en Skotlando. La plej konata kaj ŝatata estas sendube Robert Burns, kamparano kaj plugisto. Malpli konata, sed meritanta inkludon en tiu hipoteza listo estas Joe Corrie, poeto kaj dramisto de la skotaj ministaj komunumoj, kies verkaro estis unue publikigita en la jaroj post la Unua Mondmilito. Per siaj poemoj kaj teatraĵoj, Corrie iĝis propranolanto por karboministoj kiuj laboris por minejoposedantoj kiel Sir (Kavaliro) Adam Nimmo. La tiama mizera pago por ĉiu skipoperiodo en liaj minejoj estis 8 ŝilingoj kaj 4 pencoj (proksimume €0,43), kaj la plimulto ne estis dungitaj por pli ol tri aŭ kvar skipoperiodoj dum semajno.

En la sekvanta poemo, Corrie priskribis ne (kiel en aliaj versaĵoj siaj) la maljustajn kondiĉojn de ekspluatado en kiu laboris la ministoj, sed iun angoran tempon en sia persona vivo. Jen unue la originalo en la skota, kaj poste mia eksperimenta versio en Esperanto:

## **When Bess Was Badly**

Joe Corrie

*When Bess was badly and lain down sae quate,  
the red gaen frae her lip and frae her cheek,  
wi strength to smile a wee, but nane to speak,  
a lily driftin helpless in the spate,  
for three lang days I couldna eat a haet,  
I couldna rest, just wandert out and in,  
prayin to gray and empty skies abune –  
a prayer frae a hert that was clean bate.*

*The turning day, the day o life and daith  
I watched the dawnin licht the country round  
and heard a laverock sing as it had done  
sae oft when we had lingered, happy baith,  
and down I lay amang the dewy gress,  
and toomed my hert o tears for sake o Bess.*

-----

### **Kiam Bess malsaniĝis**

Kiam Bess malsaniĝis kaj sen bru'  
ŝi kuŝis tute pala sur la lit',  
lilio fordrivanta en flu',  
kun forto nur por ombro de ridet';  
kaj dum tri tagoj mi ne manĝis plu'  
sed paŝis tien-rien sen indulg'  
preĝante al ĉielo kiel fulg'  
el kor' en kiu tute mankis ĝu'.

Kaj en la kriza tag' de viv' aŭ mort'  
tristege la tagiĝon vidis mi,  
kaj aŭdis la kantadon de l' alaŭd'  
kiun, en pli felicaj tagoj, ni  
aŭskultis dum senzorga promenad',  
kaj mi ekkuŝis sur la rosa gres'  
kaj mia kor' elverŝis sin por Bess.

-----

**Girvan McKay**

\* hubulo – angle: “crofter”.

\*\* kvar se oni rigardas la ŝetlandan kiel lingvon kaj ne dialekton de la skota.

# Raporto pri Jokohamo

La 92a Universala Kongreso de nia internacia lingvo okazis de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto en Japanio. Mi ĉeestis helpe de subvencio de la Noriĉa Jubilea Esperanto-Fonduso, al kiu mi volas elkore danki.



La kongreso estis la unua en Japanio ekde la 50a UK en 1965, kiu okazis en Tokio. Ĉi tiu kongreso okazis en Jokohamo, malnova havenurbo kiu nun estas unu el la plej grandaj urboj en Japanio, kun pli ol tri milionoj da enloĝantoj. Kvankam la urbo mem estas malnova, la kongreso okazis en hipermoderna kvartalo *Minato-mirai* (Estonteco-Haveno). La kongresejo kaj ties ĉirkaŭaĵoj – inkluzive de la plej alta konstruaĵo en Japanio, la Simbola Turo (enbilde) – estas tre modernaspektaj kaj bone spegulas la disvolviĝon de la nuntempa Japanio en la 21a jarcento.

Esperanto-kongresoj en Azio estas sufiĉe maloftaj kaj la ĉeestantaro iom spegulis la geografion; pli ol duono de la kongresanoj estis japanoj, kaj multaj aliaj venis de Ĉinio kaj Koreio. Ne mankis tamen al la kongreso internacia kaj interkontinenta etoso, kun multaj eŭropaj kaj amerikaj partoprenantoj. Kiel notite de kontribuanto al la kongresa kuriero, tamen, ja estis bedaŭrinda manko de afrikaj samideanoj. Ĉeestis eble dudeko da britoj; mi estis la nura skoto.

La Kongresa Temo estis “Okcidento en oriento: akcepto kaj rezisto”; tio estas, kiomgrade la okcidentigo de la (for-)orienta kulturo estas akceptita de orientazianoj mem? La ĉefparolanto ĉe la Solena Inaŭguro, TSUDA Yokio, diris ke fakte oni povas pli ĝuste paroli pri "Okcidento **super** oriento" kaj, pli ĝuste ol "tutmondigo" aŭ "okcidentigo", oni povas diri "usonigo". Juĝe de la aplaŭdoj, certe la plejparto de la ĉeestantaro konsentis.



Kompreneble estis multaj kongresaj eventoj flanke de la Kongresa Temo. Tre oftis prelegoj pri la kulturo de Japanio kaj de orienta Azio; do ekzemple estis diskuto pri aziaj religioj, gvidata de kvar anoj de tiaj religioj (budhano, ŝintoano, konfuceano kaj ŭonbolano); kaj prelego pri hajkoj (mallongaj japanaj naturpoemoj). Ne ĉiuj tiaj eventoj estis prelegoj; ankaŭ eblis sperti demonstradon de *soroban* (japana abako) fare de 10- kaj 11-jaruloj (kies kapablon pri mensa aritmetiko oni vere devis vidi por kredi); aŭ lerni kiel ludi tradician japanan melodion *Sakura* (Ĉerizarbo) per tipa japana muzikilo *syamisen* (nia tre pacienca instruisto, Mayuko, videblas en la bildo ludante).



Eĉ eblis dum duonhoru vesti sin per kimono kaj promeni tra la kongresejo. Konservante ĉiom de la digno ŝuldinda al vicprezidanto de la Esperanto-Asocio de Skotlando, mi tion faris. La rezulton – kaj japanan amikinin, kiu trovis la tutan aferon tre amuza (ial) – oni povas vidi en la apuda bildo.

Ankaŭ ekskurse eblis apreci iom de la japana kulturo, miakaze la moderna; mi iris kun junulara ekskurso al moderna Tokio. Unu el la plej ĝueblaj punktoj en tiu ekskurso eble estis vizito al la Centro por Edukado kontraŭ Katastrofoj, kie oni povas (inter multaj aliaj aferoj) eniri ĉambron meblitan kiel kuirejo kaj sperti simulon de tertremo. (Nu, mi pli precize diru ke tiuj en nia grupo kiuj ne naŭziĝis tre ĝuis tion.) Ni ankaŭ pasigis iom da tempo en la kvartaloj *Sibuya*, proksime al la templo kie troviĝas la tombejo de la imperiestro *Meizi*, laŭdata kiel la arkitekto de la moderna Japanio; kaj *Harazyuku*, ĉefkvartalo de strangaj modaĵoj (kaj modaj strangaĵoj) por la japana junularo.

La junulara programo ofertis multe pli da farindaĵoj; ni ĝuis bankedon laŭ la japana stilo (kun pluraj malgrandaj pladoj, kaj ŝajne nehaltebla fluo de biero – ni ĉiuj tre alte ŝatis ĉi tiun sistemon); koncertojn kaj klasikajn kaj rokajn; kaj diskejojn ĝis la fruaj horoj de la tago...

Kompreneble ne ĉio en la kongreso estis tiom elstara kiom tio, pri kio mi ĵus parolis. Mi ĉeestis laborkunvenon pri "Landa Agado", kie mi esperis aŭdi pri novaj ekscitigaj ideoj de la landaj asocioj ĉirkaŭ la mondo. Tamen mi trovis, ke preskaŭ ĉiuj raportoj de ĉiuj landoj sonis tre similaj: ni havas tri naciajn renkontiĝojn jare, ni eldonas trimonatan revuon, nia membraro estas sufiĉe stabila sed necesas al ni varbi novajn junajn membrojn ktp. ktp. Ĉiuj landaj asocioj faras preskaŭ la samajn aferojn, kaj ĉiuj spertas preskaŭ la samajn problemojn. Dum ĉi tiu sesio ade venis al mi la penso ke eble necesos tute repensi pri kio temas efika landa agado por Esperanto. Se vi havas ideojn pri tio, aŭ se vi ne konsentas kun mia opinio, espereble la redaktoro de *Esperanto en Skotlando* bonvenigos viajn kontribuojn por komenci la debaton!



Sed, tion dirite, iri al Jokohamo estis bonega sperto, kaj en kaj ekster la kadro de la kongreso. En la tagoj tuj post la kongreso, mi iris al proksima historia urbeto Kamakura, kiu donis belan kontraston al la modernaj konstruaĵoj de la urbegoj Jokohamo kaj Tokio. Kelkfoje en ĉi tiu urbeto ŝajnis, ke ne eblis sin movi centimetron sen trovi novan templon. En la bildo vi povas vidi grandegan bronзан statuon de Budho, kiu troviĝas en Kamakura. Originale la statuo estis en templo, sed en la 14a jarcento cunamo forviŝis la templon; tamen restis la Budho.

Finfine, mia japana ekskurso estis mirinda sperto; koran gratulon al la Japana Esperanto-Instituto por aranĝi tiom sukcesan kongreson, kaj ĝis Roterdamo en 2008!

**Andrew WEIR**

# Reago al: *Nacia identeco – por aŭ kontraŭ*

Tiun artikolon de “Internaciulo” mi legis kun vigla intereso. Tamen mi volas respondi al la aserto de la aŭtoro, ke Zamenhof tute eraris kiam li skribis, ke la ĉefa kaŭzo de malamo inter la gentoj estas, ke aliulo estas “fremda por ni per sia lingvo kaj religio”. Sendube la plej grava kaŭzoj de milito hodiaŭ estas ekonomiaj kaj politikaj, sed Zamenhof loĝis en tute alia socio, kie la popolo estis dividita per lingvo, alfabeto, religio kaj raso, kaj pro tio tie estiĝis persekutado kaj pogromoj. Politiko apenaŭ ludis rolon en tiu tempo kaj teritorio, ĉar la potenco de la rusa caro estis absoluta.

Sed la situacio en la aktuala mondo malsimilas tiun en Bialistoko kaj Varsovio dum la vivo de Zamenhof. Jes, la tutuoj kaj hutuoj en Ruando parolas la saman lingvon; simile la diversaj komunumoj en eksa Jugoslavio komunikis per la sama serbokroata lingvo (nun intence kaj artifice dissplitigita en serban, kroatan kaj bosnian lingvojn).

Plie, la nordirlandanoj kaj la loĝantoj de la irlanda respubliko parolas la saman anglan lingvon (kvankam malsamaj formoj de la kristana religio kaj sinteno al la uzado de la irlanda lingvo ankaŭ ludas rolon en disigita Irlando). Alie, mi konsentas kun “Internaciulo” pri la plimulto de liaj opinioj. Kiel li, mi ne dezirus, ke “esperantistoj adoptu starpunkton kontraŭ nacia identeco”. Mi ĝojas, ke ni esperantistoj povas rigardi sin kiel civitanojn de la mondo, sed samtempe mi sentas min ano de la skota nacio kaj mi amegas la kulturon kaj lingvojn de nia popolo. Tamen, por mi aparteno al nure politika abstraktaĵo kiel la brita ŝtato, la brita regnaro aŭ la mizeraj restaĵoj de la eksa brita imperio estas tute indiferenta – eĉ nedezirebla - afero. Por mi la monarkio kun siaj feŭdalaj akompanaĵoj estas eksmoda kaj kontraŭa al la demokratio. Pro tio mi decidis fari mian hejmon en respubliko, malgraŭ ĝiaj malperfektecoj kaj malavantaĝoj.

Pro tio, mi esperas, ke mi vivos sufiĉe longe por vidi la tagon kiam Skotlando iĝos sendependa respubliko. La epoko de imperioj kaj de politikaj ŝtatoj kiel Britio, Sovetunio kaj Hispanio, jam forpasis. Bedaŭrinde, organizaĵoj kiel UEA ankoraŭ ne rekonas tion, ĉar ili rifuzas plene agnoski la landajn asociojn de Skotlando kaj Katalunio, pro la fakto ke tiuj ne estas politikaj ŝtatoj.

Tiuj kiuj asertas, ke Skotlando estas tro malgranda por supervivi kiel sendependa lando parolas stultaĵon. Kelkaj el la plej prosperaj kaj feliĉaj landoj en Eŭropo estas multe pli malgrandaj ol Skotlando.

Garbhan MacAoidh / McKay

---

## Email Correspondent wanted!

----- Original Message -----

From: bbo72@orange.fr

To: eab@esperanto-gb.org

Sent: Wednesday, August 22, 2007 9:20 PM

Bonan tagon

Mia nomo estas Benoît (Benedict en angla lingvo). Mi naskiĝis en 1972 en Francio, en la atlantika marbordo, en la departemento Vendee. Mi estas franco. Mi loĝas sola en apartamento. Antaŭ du monatoj, mi komencis lerni esperanton. Ĝi estas tre interesa lingvo.

Mi ŝatus diskuti kaj korespondi skribe (per retadreso) kun iu en Britio ĉar mi volas plibonigi mian esperanton. Mi parolas la anglan lingvon sed mi volas nur korespondi en esperanto.

Ĉu vi konas iun kiu akceptus korespondi per retadreso kun mi?

Mi dankas vin por via helpo kaj mi atendas vian respondon

Ĝis baldaŭ

Benoît



# When to use the accusative in Esperanto

The use of the accusative **-n** ending in Esperanto should not be seen as a complication. Actually, it can permit sentences to be more flexible and at the same time more unambiguous than in languages which do not have this feature, or which only use it in certain circumstances (e.g. English). Happily in Esperanto there are only two cases: the unmarked nominative case, and the accusative. By contrast, German has four noun cases, Czech has seven, Estonian 14, and Tabasaran (spoken in southern Daghestan) has 44.

There are 3 basic circumstances in which the accusative is used in Esperanto:

## 1. To indicate the object of a transitive verb

The subject of a verb is the person or thing doing the action in the verb, while the object is the thing or person on the receiving end of the action. In Esperanto, the object is usually marked with an **-n**, if possible. A transitive verb is one which either normally takes, or happens to be taking an object.

**Mi vidas la hundon**  
**La hundo vidas min**

“I see the dog”  
“The dog sees me”

The word order is not the deciding factor in whether the **-n** ending is used, but the role in the sentence:

**La kato ĉasas la hundon**  
**La hundon ĉasas la kato**

“The cat chases the dog”  
“The cat chases THE DOG”

These two sentences both mean the same thing, but the second one has a change of emphasis because of the unusual word order.

Verbs which are not transitive, such as **esti** “to be” and those ending in **-iĝi** “to become” do not take the accusative, because they are regarded as having predicates, not objects:

<b>La prezidento estas idioto</b>	“The president is an idiot”
<b>Mia onklo fariĝis instruisto</b>	“My uncle became a teacher”

Note that verbs such as **egali** “to be equal to”, **signifi** “to mean” and **simili** “to resemble” are regarded as transitive verbs in Esperanto, as are compounds of **esti**::

<b>Cent centimetroj egalas unu metron</b>	“A hundred centimetres equal one metre”
<b>Ĝi signifis nenion</b>	“It meant nothing”
<b>Ili ĉeestis la kongreson</b>	“They were at the congress”

Some objects, such as a) phrases not headed by nouns; b) non-esperantised proper names; c) entire clauses; d) quotations and titles; and e) most numbers, are not able to take an accusative ending:

a)	<b>Multe da katoj vidis multe da hundoj</b>	“Lots of cats saw lots of dogs”
	<b>Gajni superas egalludi</b>	“Winning beats getting a draw”
b)	<b>Fred vidis Margaret</b>	“Fred saw Margaret”

The default Subject-Verb-Object word order in (a) and (b) tells us who saw who (or who saw whom, if you prefer), and what beats what. Proper names ending in **-o** and **-a** typically take an accusative ending, sometimes separated by an apostrophe or a hyphen to indicate what part of the word the name itself actually is, e.g. **Li vizitis Anna'n** “He visited Anna” where the apostrophe makes it clear that the meaning is not “He visited Annan”. Sometimes proper names not ending in **-o** or **-a** have **-on** added, e.g. **Fred vidis Margaret-on**, but this is unnecessary. Alternatively, sometimes a noun or noun phrase which is able to take an accusative is inserted in apposition, e.g. **Fred vidis sian edzinon Margaret**, but again, this is unnecessary.

c)	<b>Mi komprenas kio okazas</b>	“I understand what is happening”
----	--------------------------------	----------------------------------

**Ŝi scias kiu ricevos la postenon**

“She knows who will get the job”

Here **kio** is the subject of the clause **Kio okazas**, and **kiu** is the subject of the clause **Kiu ricevos la postenon**, and thus have to remain unchanged. See the note on **tio(n)**, **kio(n)** below.

- d)      **Ŝi diris “Rubaĵo!”**                      “She said “Rubbish!””  
         **Īli vendos “Ondo de Esperanto”**                      “They will be selling “Ondo de Esperanto””  
         **La franca vorto “chien” signifas “hundo”**                      “The French word “chien” means “dog””

Here **rubaĵo**, **ondo** (“wave”) and **hundo** are all normal Esperanto nouns which would in other circumstances take an accusative ending.

- e)      **Mi havas ses da**                              “I have got six of them”

However, if the numeral is a noun, or heads a noun, the noun can take an accusative if this would be appropriate (e.g. if the phrase is the object of the sentence).

- Mi havas milionon da**                              “I have got a million of them”  
**Mi havas milojn da**                                “I have got thousands of them”  
**Mi havas tri pomojn**                              “I have three apples”

## 2. In phrases headed by a preposition to add the meaning of motion towards to a preposition which does not already have it.

Unlike many other languages which have prepositions and noun cases, prepositions in Esperanto usually take the nominative (unmarked) case. In English, for example, prepositions take the object case where available, e.g. in English we say “about him”, not “\*about he”. In other languages, such as German, Russian and so on, some prepositions can take more than one case, although not the nominative. Thus in:

- La musoj estis sub la tablo**                      “The mice were under the table”

the prepositional phrase **sub la tablo** is headed by the preposition **sub** meaning “located under”, and the preposition governs its dependent

noun phrase **la tablo**, which remains in the nominative. However, in the sentence:

**La musoj kuris sub la tablon**      “The mice ran under the table”

the meaning of motion towards has been added to the preposition **sub** when it did not originally have this meaning. But if we missed out the **-n** and said:

**La musoj kuris sub la tablo**      “The mice were running around underneath the table”

this would mean that the mice were already under the table when they started running, and **sub** would have retained its original meaning of “located under”. Many prepositions in Esperanto have this dual use: location + nominative, motion towards + accusative:

**Mia amatino estas trans la maro**      “My girlfriend is (at) across the sea”

**Mi vojaĝis trans la maron**      “I travelled (to) across the sea”

Some prepositions however already contain the meaning of motion towards, e.g. **al** (“to”), **ĝis** (“as far as”), and these are never used with the accusative, because the meaning of motion towards never needs to be added:

**La trajno alproksimiĝis al la stacidomo**      “The train approached (to) the station”

**Li atingis ĝis la mezo de la rivero**      “He reached (as far as) the middle of the river”

Some adverbs in Esperanto which appear to be functioning as prepositions, and which are derived from transitive verbs, take the accusative, and not the nominative:

**Ĉio estas tie, inkluzive la librojn**      “Everything is there, including the books”

### 3. In expressions of size, distance, duration, time etc., and some expressions of motion towards

These may be regarded as a special case of (2) above, in that an additional meaning is added, but no preposition is involved. It is as if the **-n** is a substitute for a preposition.

- |    |  |  |
|----|--|--|
| a) | <b>La kurtenoj estis du metrojn longaj</b>                                     | “The curtains were two metres long”                                    |
| b) | <b>La kastelo estas tri kilometrojn for<br/>Ni vojaĝis tricent kilometrojn</b> | “The castle is three kilometres away”<br>“We travelled 300 kilometres” |
| c) | <b>La milito daŭris ses jarojn</b>   | “The war lasted six years”   |
| d) | <b>Ŝi venos vendredon</b>  | “She will come on Friday”  |

Indeed, all of these examples could be expressed instead by the use of the indefinite preposition **je** plus the nominative: **la kurtenoj estis longaj je du metroj**; **la kastelo estas je tri kilometroj for**; **ni vojaĝis je tricent kilometroj**, **la milito daŭris je ses jaroj**; **ŝi venos je vendredo**.

Notice in (a) that **longaj** is agreeing with **kurtenoj**, not with **metrojn**. Note also in (d) that the use of the accusative **vendredon** contrasts with the use of the adverb **vendrede** :

<b>Ŝi venos vendrede</b>	“She will come on Fridays”
--------------------------	----------------------------

Formerly (until about 1950) it was common in Esperanto to use the accusative with nouns in expressions of motion to a destination, e.g.:

<b>Mi iros Londonon</b>	“I am going to London”
-------------------------	------------------------

This usage is no longer normal in Esperanto, and should be regarded as archaic. Nowadays, this sentence would be expressed as **mi iros al Londono**.

However, motion along a particular distance is still normally expressed using the accusative, as in the second example in (b) above. It is also

completely normal in modern Esperanto to add an “accusative” **-n** on to adverbs to express motion:

**Kie vi estas?**

“Where (at) are you?”

**Kien vi iras?**

“Where (to) are you going?”

**La monero estis surtere**

“The coin was (at) on the ground”

**La monero falis surteren**

“The coin fell on (to) the ground”

#### 4. Note on **tio(n)**, **kio(n)**

The **tio(n)**, **kio(n)** construction is used with relative clauses by creating a dummy place-filler **tio(n)** antecedent in the main clause that the referent **kio(n)** in the relative clause can refer back to, but which would not otherwise exist. There are four possibilities, a) **tio/kio**, b) **tion/kio**, c) **tio/kion** and d) **tion/kion**, depending on whether a) neither the antecedent nor the referent, b) only the antecedent, c) only the referent, or d) both the antecedent and the referent are in the accusative, i.e. are the object in their respective clause or not:

- |    |  |  |
|----|--|--|
| a) | <b>Jen estas (tio), kio nun laŭmodas</b>       | “Here is (that) what is now the fashion”               |
| b) | <b>Mi ellaboris (tion), kio estos la plano</b> | “I have worked out (that) what will be the plan”       |
| c) | <b>Ne konsilindas (tio), kion vi faros</b>     | “It is not advisable, (that) what you are going to do” |
| d) | <b>Mi komprenas (tion), kion vi celas</b>      | “I understand (that) what you are aiming at”           |

However, in all of these, including (b) and (c), the dummy antecedent **tio(n)** can be dropped without requiring the form of **kio(n)** to be changed:

- |    |  |   |
|----|--|---|
| a) | <b>Jen estas kio nun laŭmodas</b>      | “Here is what is now the fashion”         |
| b) | <b>Mi ellaboris kio estos la plano</b> | “I have worked out what will be the plan” |

- c) **Ne konsilindas, kion vi faros** “It is not advisable, what you are going to do”
- d) **Mi komprenas kion vi celas** “I understand what you are aiming at”

Of course, the relative clause doesn't have to follow the main clause; it could precede it. The same thing is also possible with other pairs of correlatives, e.g. **tiu(n), kiu(n)**.

## 5. Note on multiple objects

More than one thing or person can be the object of the verb in a clause, for example in a list:

**Mi havas piron, persikon, pomon, kaj oranĝon** “I have a pear, a peach, an apple, and an orange”

It is not possible to have more than one direct object expressed by the accusative in the same clause, unless it is in a list like this.

If the items in the clause are playing different roles in the sentence, only one of them can be marked by the accusative in Esperanto. In English we are allowed to say “I gave the boy the book”. Here “the boy” is regarded as the indirect object, and this relation to the verb could also be expressed by the preposition “to”, and the sentence rewritten “I gave the book to the boy”. This latter method is the only way that **doni** (“to give”) is used in Esperanto:

**Mi donis la libron al la knabo** “I gave the boy the book” /  
“I gave the book to the boy”

With the verb **doni** in Esperanto, only the thing which is given can be the object of the verb, and the person given to has to be part of a prepositional phrase with **al**. Some other verbs in Esperanto are not so particular. With **sciigi** (“to inform, to let know”), the object can either be the person informed, or the thing informed about:

**Mi sciigis lin pri la historio** “I let him know about the story”  
**Mi sciigis al li la historion** “I let him know about the story”  
**Mi sciigis al li pri la historio** “I let him know about the story”

Thus, in Esperanto in this example, either “him” or “the story” can be the object of the sentence in the accusative, and the other has to be expressed by a prepositional phrase. Alternatively, as in the third version, two prepositional phrases could be used. However, we cannot say **\*mi sciigis lin la historion**, because this would give us two accusative phrases in the same clause, both direct objects. It is possible, however, to have two items in the accusative in the same clause, as long as only one is a direct object:

**Vendredon mi sciigis lin**                      “I let him know on Friday”

It is good style to separate the two accusatives in some way in case they are confusing if placed side by side.

## 6. Other troublesome circumstances

a) **Po, da, krom, anstataŭ**: With some prepositions the use of both the nominative and the accusative are both regarded as acceptable, by most authorities, and both are in common use by perfectly competent Esperanto speakers.

**La infanoj ricevis po pomo(n)**                      “The children received an apple each”

Here the accusative is justifiable if the **po** is regarded as an adverb not affecting the role of **pomon** as an object of the verb, just as if we had said **la infanoj ricevis du pomojn**. However, we tend not to find the accusative after **da**:

**La infanoj ricevis da pomoj**                      “The children received some apples”

With **krom** and **anstataŭ** they work in much the same way, but there is a difference in meaning depending on whether the nominative or the accusative is used.

**Krom li, ni vidis nenium**                      “Apart from him, we saw nobody, i.e. he saw somebody, but the rest of us didn't”



**Krom lin, ni vidis nenium** “Apart from him, we saw nobody, i.e. we saw him, but apart from that, we saw nobody”

**Mi vidis la policanon anstataŭ la instruisto** “I saw the police officer instead of the teacher, i.e. the teacher didn't see the police officer”

**Mi vidis la policanon anstataŭ la instruiston** “I saw the police officer instead of the teacher, i.e. I didn't see the teacher”

b) Apposition: Nouns or pronouns in apposition to items in the accusative do not have to show the accusative. Either is acceptable:

**Mi vidis Ĝina'n, la ĉefo(n)** “I saw Gina, the boss”

c) Word formation: Components conceived of as originally being accusative do not need to retain the **-n** in forming compound words:

**Li scias ĉion** “He knows everything”  
**Li estas ĉio(n)scia** “He is omniscient”

d) The predicative nominative: If showing the result of an action as opposed to the object, the result goes in the nominative:

**Mi farbis la pordon blua** “I painted the door blue”  
**Mi farbis la pordon bluan** “I painted the blue door”  
(or **bluan pordon**)

In the first example, it is as if there is an imaginary **esti** before the adjective in the nominative:

**Mi farbis la pordon (esti) blua** “I painted the door (to be) blue”

## 7. Finally ...

If in doubt, leave the **-n** out!

Ed ROBERTSON

# La romanco de Klingo Kulter

Klingo Kulter estis knabo kiu donis sin al rabo  
de la horo kiam li konstatis ke  
taglaboro estas kara al la grego ordinara,  
sed al Klingo Kulter absolute ne.

Li diskutis pri l' problemo kun aliaj kies emo  
estis kontraŭ gurde teda tagrutin'.  
Ili baldaŭ do ekplanis krimprogramon kaj aklamis  
sian elektitan ĉefon, nome lin.

Kaj furore tra la lando kuris famo pri la bando.  
Kia listo de detruo kaj turment':  
ŝtelo, rabo, fajro, murdo; por viktimaĵoj – surdo,  
kaj fervora sekskuniĝo sen konsent'!

Tamen el ĉi tiu famo kreskis iu kvazaŭamo,  
kiu sin direktas plej al Kulter mem;  
la renomo apogeis ĉar legendon oni kreis  
kun la virt' de Kulter kiel ĉefa tem'.

Laŭ ĉi fonto, li alvenis al urbeto kiu emis  
lin defii per rezisto kaj insult'.  
Li ordonis do ke oni sin prezentu por proponi  
kia morto preferindos al plimult'.

“Ĉu pendumo? Ĉu mortpafo? Ĉu ponardo aŭ ĉu glavo?  
Ĉar mi mem indiferentas pri metod'”,  
li anoncis grandanime, dum la burĝoj kaŭras time  
en la ombro de impona eŝafod'.

“Nu do”, li konjektis fine, “laŭ silento ankaŭ vi ne  
multe ĝenis vin pri ilo kaj detal'.  
Tre prudente! Do ni diru ke vi ĉiuj supreniru  
laŭ diversaj manieroj al Valhal”.

Kaj l' urbestron li indikis; ties kapon enmaŝigis,  
kaj faligis la klappordon per signal'.  
La aliaj sen admiro notis kiel la martiro  
kreis novajn dancajn paŝojn sen formal'.

Dua venis al vivfino sur efika gilotino,  
per hakilo kaj per kuglo tri kaj kvar,  
sed alportis kvin problemon: oni ne atendis venon  
de knabina bela el rigardantar'.

Alpaŝinte ŝi sen timo fingromontris al viktimo,  
kaj ŝi kriis: “De ĉi homo manojn for!  
Ĉar li patris min, kaj tial sen hezito turnu li al  
la filino nun en kriza hor',

“kaj ne vane, ĉar per amo kiun donis li la samo  
disponeblas nun, instige al ofer'.  
Do de mia vivdoninto nun turniĝu la glavpinto,  
kaj per mia viv' satiĝu la koler”.

La banditoj raŭke ridis, sed amuzon Kulter bridis  
per esprim' severa kaj levita man',  
kaj li kriis: “Ĉi knabino min kortuŝis, kaj l' animo  
ekmoliĝas, kaj mi kredas ke pro am'.

“Jes, ĉar ŝia am' al tiu maljunulo tie, sciu,  
vekis amon al ŝi mem en mia kor'.  
Ho, ĉu vi, kvankam aĉuloj, vere volas el okuloj  
kiaj ŝiaj premi perlojn de dolor'?”

Konsternite de la homo, Violenta Valter Vomo,  
la vicestro, lin respondis post moment':  
“Ĉu vi ŝercas? Ĉu mi aŭdas ĝuste? Ĉu vi vere laŭdas  
tiun aĉan mukulinon sen prudent'?”

“Ĉar la knaboj ne toleros, sciu, homon kiel ĉefon, kiu  
larmoŝpruce cedos al bombast',  
kaj sincere mi konfesu ke vi tedas min; do ĉesu”.  
Kaj li pafis Klingon Kulter sen prokrast'.

Je ĉi tiu sensacio la knabino kun ŝirkrio  
tuj alkuris kaj brakumis al viktin'.  
Ŝi defiis Vomon: “Min do nun ekpafu la murdinto”.  
“Tre volonte”, diris li, kaj pafis ŝin.

Sed incitis tiu ago la urbanojn al atako,  
kaj la bando for de Vomo turnis sin  
kiam li al ili vokis por subten', ĉar ilin ŝokis  
kiel krude falĉis Klingon la destin'.

Do tri homoj drame mortis, sed ne same poste sortis,  
ĉar folkloro vindis ilin per fabel',  
asignante al infero unu, kiun mitkoboldoj punu,  
dum l' aliaj du brakumas en ĉiel'.

John FRANCIS

🏰 **Ĉu vi vidis nian TTT-ejon?** 🏰

Por la plej lastaj novaĵoj pri Esperanto  
en Skotlando kaj ĉirkaŭ la mondo

Direktu vian krozilon al:

**<http://www.skotlando.org>**

# Diversaj opinioj

Unu el la grandaj virtoj de Esperanto estas la eblo renkonti diversajn homojn el la tuta mondo, kaj de ili aŭdi diversajn ideojn, malsamajn perspektivojn. Pasintjare la tutmonda kongreso de SAT okazis en Beogrado, ĉefurbo de Serbio. Tie mi aŭdis la unuan fojon la *serbian* version de kio okazis en Balkanio, pli precize en Bosnio, kaj renkontis ĉarman juristinon de Banja Luka (pri kio ni ĉiuj aŭdis). Ŝi tiom fervore provis klarigi al mi sian perspektivon de la tuta afero, ke mi invitis al ŝi verki artikoleon, por ke miaj skotlandaj samlingvanoj povu legi tiujn ideojn, en la paĝoj de *Esperanto en Skotlando*. Jen kion ŝi verkis. Mi ne petas ke iu konsentu kun ĉiu vorto; mi simple invitas al vi rekoni kiom varie povas vidiĝi la mondo, de unu lando al alia, de unu gento al alia, de unu ideologio al alia. Magie, tra Esperanto, oni povas rekte sperti tiujn variajn vidpunktojn kaj ekpensi ke eble, eble, oni ne ĉiam, ne ĉiel pravas ..... legu kaj pensu.

David KELSO

---

## Pri Respubliko Srpska

Respubliko Srpska ekestis kiel rezulto de batalo por konservo de la antaŭa, internacie akceptita ŝtato, SFR Jugoslavio. La Artikolo 1 de la Konstitucio de Respubliko Srpska asertas ke ĝi estas ŝtato de la Serba popolo kaj de ĝiaj civitanoj ankaŭ. Respubliko Srpska estas parto de Bosnio kaj Hercegovino (BkH), kiel unu el du ŝtato-partoj (t. n. “entitetoj”) de BkH. En BkH estas du tiaj partoj: Respubliko Srpska (RS) kaj Federacio de Bosnio kaj Hercegovino (FBkH) kaj ili du kune faras ŝtaton Bosnio-kaj-Hercegovinon.

Akceptinte la Dejtonan Pac-ĉarton je 21-a Novembro 2005, Respubliko Srpska estas akceptata kiel parto de ŝtata komunumo Bosnio kaj Hercegovino. En Respubliko Srpska oni starigis parlamentan demokration. Agantan, juĝantan kaj regulantan aŭtoritaton oni dividis laŭ tiu principo de Monteskie [Montesquieu]. En Respubliko Srpska vivas la Serba popolo kiel majoritato, sed ĉiuj rajtoj estas garantiataj por ĉiuj minoritatoj ankaŭ.

Serboj estas pacemaj kaj komunikemaj, sed en ĉiuj tri militoj (la Unua Monda, la Dua Monda, kaj tiu 1992–1995) ĝi suferis egan persekutadon. En tiu lasta milito ĝi estis plej dislokigata el ĉiuj suferantaj popoloj. La militon partoprenis ĉiuj, Serboj provantaj konservi, kaj Kroatoj kaj muzulmanoj (hodiaŭaj Bosnianoj) provantaj dispartigi iaman SFR Jugoslavion. Serboj volis konservi kaj defendi sian tiutempan patrolandon - Jugoslavion, kiu fakte estis lando de ĉiuj siaj popoloj kaj etnaj grupoj. Aliaj popoloj volis detrui tiun landon, kiu laŭ mia opinio havis pli justan socialisman sistemon.

Homaj rajtoj kaj liberoj estas garantiataj pere de la Konstitucio de Respubliko Srpska same kiel tio estas priskribita en internaciaj normoj. Serba himno estas “Bože pravde” (“Ho, Vi Justa Dio”). Serboj altvaloras justecon kaj veron, ĉar ili suferis grandan mortigadon kaj maljustecon kiel viktimoj de granda media kampanjo estintaj anoncataj kiel solaj kulpuloj por tiu lasta milito.

Serbaj gvidantoj estas malamataj de grandaj mondaj fortuloj kiuj pasie persekutas ilin kaj punigante Serbajn gvidantojn volas punigi ĝuste la Serban popolon.

Serboj havas siajn mondkonatajn grandulojn, unu el tiuj Nikola Tesla. Riĉecon de la animo de la serba popolo, tiu slaveca animo, plej ĝuste reprezentas grandaj nomoj el literatura arto. Unu el tiuj, Petro Koĉić el Banja Luka, diras: “Tiu kiu sincere kaj pasie amas veron, liberecon, kaj patrolandon estas libera kaj sentima kiel Dio sed malamata kaj malsata kiel hundo”.

**Mira MAKIVIĆ**

# La persisto de la junaj viroj

Dum la Aŭtuna Studrondo de 2006, Tom Neil faris interesan prelegon pri la vivo kaj verkado de la skota poeto William Soutar (1898-1943). Jen provo mia traduki lian poemon **The Permanence of the Young Men**.

## *The Permanence of the Young Men*

*No man outlives the grief of war  
Though he outlive its wreck:  
Upon the memory a scar  
Through all the years will ache*

*Hopes will revive when horrors cease;  
And dreaming dread be stilled;  
But there shall dwell within his peace  
A sadness unannulled.*

*Upon his world shall hang a sign  
Which summer cannot hide:  
The permanence of the young men  
Who are not by his side.*

## *La persisto de la junaj viroj*

*Neniu aflikton de l' milit'  
postvivas, krom ruin':  
restos cikatro de l' spertit'  
kaj la dolor' sen fin'*

*Restos esper' post la horor';  
trankvilo post inkub'  
sed eĉ sur lia paca kor';  
pezos mornega nub'*

*Sur lia mondo pendos ŝild'  
malgraŭ somera ĝu':  
persisto de ilia bild'  
kiuj ne estas plu.*

*Esperantigita de Garbhan MacAoidh*

# Ponte San Niccolo



Hasta duŝo  
antaŭ manĝo  
lastan tagon  
de l' ferio.  
La edzino vice  
dum mi  
vestas min rapide.

Kion porti  
piedire  
al la fora  
pica-ejo?  
Minimumon!  
pro l' ŝvitiga  
atmosfera Florenca.

“Ĉu la fotilo?”  
“Ne necesas!”  
Dank' al Dio!  
La ŝultro montras  
ruĝan strion  
pro la rimeno  
de la porta sak'.



Jam kvin tagojn  
en Kongreso  
nur manplenon  
fotis mi, do  
kun monujo  
kaj ŝlosilo  
ni iras, ek!

Post dek minutoj  
de anhela  
promenado  
venas ni  
(jam malfruaj  
por la tablo)  
ĝis *Ponte San Niccolo*.

Plua dek  
venigos nin  
al la plej bona  
*Pizzeria*  
de la urbego.  
Ek! Ek! Ek!

Ĝis pontomezo kie  
ni turnas la kapojn pro la vidaĵo  
kiu bremsas nin en nia flugo, ravitaj, al silenta staro.

Buŝmalfermaj ni spektas sunsubiron de sur la ponto mirindan, gloran.  
Hazardarangaj domoj sabloŝtonaj dividas la riveron flav-oran  
de sunlumspegula ĉielo super samperfekta makulmanka fluo.  
Nun iĝas muzika akompano la kakofonia urbega bruo  
por l' admono dolĉa mokanta min sen mia teknologio moderna,  
dum tiriĝas la koro alterne pelata pro la sciiĝo konsterna.

**Hugh REID**

# El vino, la vero

Du nejunaj esperantanoj, veteranoj de multaj kongresoj, babilis dum la ĉijara kongreso. Ĝak plendadis ke li ege suferas pro sendormo.

“Ho,” diris Tam. “Mi havas bonegan solvon por tiu problemo.”

“Ĉu vere? Kia estas, do?”

“Nu, se vi ne sukcesas ekdormi, prenu glaseton da viskio, preferende po duonhore.”

“Kaj tiel mi sukcesos ekdormi?”

“Fakte ne, sed la sendormo estos multe pli agrabla.”

\*\*\*

Estas fakto nekontraŭdirebla ke la samideanoj en Glasgovo tro drinkas. Iun mardon, post festa klubvespero, Daĉjo ebriis (denove) kaj sukcesis, ne unu sed dufoje trafi malĝustan aŭtobuson por hejmeniri. Fine, dank' al malpli ebriaj samurbanoj, li trafis ĝustan aŭtobuson kaj eksidis apud severmiena pastro, kiu malaprobe rigardis nian kompatindan kolegon kaj diris:

“Filo mia, sciu ke tiu vojo kondukas rekte al Infero.”

“Merd'!” respondis Daĉjo. “Kaj tiu fiulo insistis ke estas l' aŭtobuso al Barmaloĥ.”

\*\*\*

Estas ruzaj la edinburganoj. Samideano el tiu gracia urbo (fakte alta oficulo en ties internacilingva societo) vizitis teatron kun la edzino, kiel oni faras en Edinburgo por elmontri la kulturecon. La edzino riproĉis lin,

“Silvestro,” (tiel nomiĝas edinburganoj), “vi ĵuris al mi antaŭ nur du tagoj ke vi ne drinkos dum tuta jaro. Tamen en la bufedo vi ĵus eltrinkis du glasetojn da viskio.”

“Jes vere,” respondis nia ruzulo, “sed ĉu vi ne legis, kara, en la programo, ke inter la unua kaj la dua aktoj pasis jam du jaroj?”

\*\*\*

Dum la lastatempa kongreso en Lanark, fifama kongresano (kiu post dek jaroj ankoraŭ ne vere komprenas la akuzativo) subite falis, meze de kafpaŭzo. Tuj formiĝis ĉirkaŭ li grupo da tre spertaj movadanoj.

“Voku helpon! Tuj, tuj! Kuraciston!” ekkriis unu, bele uzante la akuzativon eĉ sen verbo.

“Ne, ne, iom da viskio sufiĉos,” milde proponis maljuna kongresanino.

“Foriĝu, kanajloj,” insistis tria, eĉ komitatano tiu. “Lasu al li aeron!”, forpuŝante la gapantojn.

“Karaj,” ĝentile ripetis la oldulino, “mi certas ke eta viskio solvos la problemon.”

Subite la sveninto rekonsciigis, malfermas la okulojn kaj, per febla voĉo diras, “Silentu, ĉiuj, kaj permesu paroli tiun saĝan sinjorinon.”

\*\*\*

Tiu sentaŭgulo, nia eskapredaktoro, antaŭnelonge gajnis premion en loterio ĉe la glasgova klubo, botelon da bela kroatia vino. Plej kontenta, li hejmeniris, fajfante, pensante pri posta gustumado de la vino, eble kun iom da forta kalabria fromaĝo. Tiel revante, li ne rimarkis truon en la trotuaro (ja iuj estas en tiu urbo, bedaŭrinde) kaj teren falis. Neniom vundita, feliĉe, sed ekstarante li sentis malsekon apud la poŝo kie lokis la vinbotelo.

“Ho kara Dio, patrono de piaj glasgovanoj, faru ke tio estu nur sangol!”

# Neforgesebla Skotlanda Esperanto-Kongreso

Hazarde mi eksciis el la interreto ke okazos la 102-a skotlanda E-kongreso dum la 15a ĝis 17-a de Junio en Lanark. Ho, La 102-a kongreso? Nekredeble! Mi ĝin ĉeestu! ----Tio ja estis mia unua penso.

Verdire, mi ne bone scias pri Brita E-movado, eĉ ne scias la ekzistadon de skotlanda Esperanto Asocio. Vere hontinda pri tio.

Tuj mi skribis al la Skotlanda E-Asocio kaj ricevis rapidan respondon de David Kelso.

Antaŭ mia alveno al la Skotlando, mi jam estis kortuŝita de Skotlanda Esperanta Asocio----Mia Casey sendis al mi detalajn instrukciojn pri la trajnohoraro de Glasgovo ĝis Lanark, inkluzive la vojo al la konvenejo, kun mapoj k.t.p. David Kelso skribis ke li povus renkonti min ĉe Glasgovo flughaveno kaj veturigi min al la urbocentro de Glasgovo.

Kvankam mi ŝercis ke Lanark bonvenigas nin per vento kaj pluvo, kiel vintro malvarma, tamen neniuj povas nei atmosferon printempan ĉiam ĉirkaŭ la kunvenejo.

35 homoj partoprenis el 8 landoj, amikece babilante per nia lingvo, ne krokodile. Devas diri, ke la lingva kapablo de skotlandaj esperantistoj estas alta. Tiu ĉi kunveno estas la unika nekrokodila kunveno kiun mi ĉeestis. Mi eĉ enviis ilian fluan parolon de Esperanto.

La prelegoj estis elstaraj kaj interesaj, Vlad'ka Chvátalová, nia gastparolantino, kiu estas tradukistino de la Eŭropa Unio en Bruselo, prezentis al ni sian landon Ĉeĥio kaj la Eŭropan Union; La plej juna skotlanda esperantisto Andrew faris tre interesan prelegon pri la temo lingvistiko por la perpleksitaj; Ankaŭ Hju Reid kaj Jack Casey donis al ni altnivelajn prelegojn. Dum la kongreso oni bankedis, manĝetis, trinkis eĉ drinkis. Ni ĝuis la belajn pejzaĝojn de Lanark kaj New Lanark. Krome por mi mem mi ankoraŭ havis specialan sperton, tio estis Esperanta diservo.

Ekzistas kultura diferenco inter Ĉinio kaj Britio, mi ne estas kristanino, tamen ege plaĉas al mi la sankta kaj kvieta etoso de preĝejoj. Mi spertis unufojan diservon en Cardiff, ĝi estis en la angla lingvo, sed ĉifoje estis Esperanta, tute per Esperanto. Mirinde!

De post mia esperantistiĝo pli aŭ malpli da E-aktivadoj mi ĉeestis en Ĉinio kaj alilandoj, kiel iama aktivulino kaj nuna prezidantino de nia provinca E-Asocio, ankaŭ mi mem organizis kunvenojn, mi povas diri, ke tiu ĉi kunveno estas la plej bona el miaj spertoj.

Danke al la bona organizantaro de Skotlanda E-Asocio, ĉio estis en ordo, ĉiu programero iris en ordo. Mi vidis, ke David Kelso vigle okupiĝis ĉiam kun rideto, Mia Casey faris multon por ĉeestantoj. Mi vidis ankaŭ aliajn harmonie kaj unuanime penadi por la kongreso. Ne estas facila afero por bone organizi kunvenon, Mi kredas ke ili faris sufiĉe da preparado, tio estas laŭdindebla.

Eble, tiu ĉi kunveno estus mia lasta aktivado dum mia restado en Britio. Tamen, vere mi ne esperas tiel!

Vere ĝuinda la kongreso estis!

**Xiaofeng GONG**

### **Iom pri mi**

Xiaofeng Gong (Esperanta nomo estas Arko), profesorino de Nanĉango Universitato, Nanĉango Urbo, Jiangxi provinco, suda Ĉinio, nun laboras kiel vizitanta profesorino en Cardiff Universitato por unu jaro, esperantistiĝis antaŭ 27 jaroj pere de memlernado. Dum la unuaj 7 jaroj estis vigla aktivulino en la loka E-movado. Poste eniris en la universitato por Magistra studado kaj instruistiĝis, poste doktoriĝis kaj profesoriĝis en la universitato. Kiel handikapito, tio estas ege malfacile atingebla en Ĉinio, oni devas penadi multon. Do, dum tiuj 10 jaroj ne plu partoprenis E-aktivadojn, tamen neforlasis la korespondon kun kelkaj alilandaj amikoj kaj enlandaj famaj esperantistoj. Antaŭ 7 jaroj denove aktivadas en Esperantujo, nun estas komitatano de Ĉina Esperanto Ligo kaj prezidantino de Jiangxi-a Esperanto Asocio.

## Bildoj de la 102a Kongreso en Lanark



# La 103a Skotlanda Kongreso de Esperanto

THE INVERSHIN HOTEL  
Sutherland  
6/7/8/9 junio 2008



La 103a Skotlanda Kongreso de Esperanto 2008 okazos en la intima etoso de la trankvila Invershin- [invər'ʃin] Hotelo en la regiono Sutherland ['sʌðər'lɪnd], la plej nordokcidenta en Britio. La regiono etendiĝas al tri marbordoj. Invershin mem estas 53 mejlojn/85 km norde de Inverness. **Tuj apud la hotelo estas fervoja haltejo kun regulaj trajnoj.** Trans la rivero Kyle [kajl] of Sutherland, kiu atingas la maron ĉe la Dornoch- ['dɔrnəx] Fjordo, estas la mondscale konata junulargastejo Kastelo Carbisdale ['kərbisdeɪ]. Estas tre interesa historio pri la kastelo sed por aŭdi ĝin, vi devos atendi ĝis la kongreso. La kongreskotizo inkluzivas refreŝiĝaĵojn sed kongresanoj devos fari proprajn aranĝojn pri manĝoj (krom sabatvespere) kaj loĝado. La eblecoj estas:

a) *The Invershin Hotel* - Telefono/Telekopiilo +44 (0)1549 421202

*Lito kaj matenmanĝo £30 ponokte*

b) *Carbisdale Castle Youth Hostel* - Mendoj +44 (0)8701 553 255

*Memzorgado aŭ manĝoj aĉeteblaj*

*Retejo: [www.syha.org.uk](http://www.syha.org.uk) (Prezoj haveblaj nur post 01/01/2008)*

**Se vi ne frue faros mendon, tiam vi devos loĝi en la kastelo, nur dudek minutajn promene de la kongresejo.** La temoj de la kongreso pritraktos la altlandan kulturon, kaj inter ili estos: *la verkisto Neil Gunn, la monumentoj kaj lingvo de la Piktoj, la altlandaj fervojoj, la kelta muzika gamo, kaj la forpeladoj de la kamparanoj dum la 19a jarcento.*

Por aliĝi al la kongreso, bv. uzi la formularon sur la sekvanta paĝo.

**Aliĝilo - 103-a Skotlanda Kongreso de Esperanto  
Invershin, Sutherland, 6-9 junio 2008**

Kotizo ink. de ekskurso al Kastelo Dunrobin, urbo Dornoch, kaj sabata vespermanĝo. Por eniri Kastelon Dunrobin mem estas kroma pago.	£50.00
Sen sabata ekskurso	£25.00
Unutaga kotizo	£12.50

<b>Mi kunsendas ĉekon valoran</b>	<b>£</b>
<b>Mi donacas al Skota Esperanto-Asocio</b>	<b>£</b>

Bonvolu indiki se vi volas partopreni postkongresan ekskurson al la okcidenta marbordo, lundon la 9-an de junio. (Ĉu okazos dependas de kiom da partoprenontoj sin proponos)

Vegetarano?

Ĉekoj estu pagendaj al “Scottish Esperanto Association”. Bonvolu sendi aliĝilon kun pago, preferende antaŭ la fino de majo 2008, al:

S-ro David Hannah, Tigh na Cnoc, Ardgay Hill, Ardgay, IV24 3DH, Skotlando

Retpoŝte: [dhannah559@hotmail.co.uk](mailto:dhannah559@hotmail.co.uk) Telefono: +44 (0)1863 766 061

*David volonte respondos demandojn pri la kongreso.*

Nomo	
Adreso	
Telefono	
Retadreso	



# Kristnasko je la Krucvojo

“Haltigu la aŭton!”

La ordono de Mari estis abrupta. Ĉu mia ŝoforado estis tiel malbona?

“Stacidomo Altbar iam troviĝis ĉi tie”. Ŝia voĉo estis malpli agresema, pli la kutima, agrabla sono.

“Mi scias tion”, mi diris, ridetante mian indulgon. “Do?”.

Ŝi rigardis antaŭen, supren laŭ la vojo. “Mi venis ĉi tien ofte. Kiam mi estis juna. Miaj geavoj posedis farmbienon apude. Nu, vere bieneton”.

Mi atendis. Pli bone ne interveni kiam Mari nostalgias.

“Veturu pluen kaj mi montros al vi la lokon”.

Mi glitigis en la unuan rapidumon. Irinte supren laŭ la deklivo, ŝi priskribis la vojaĝeton per vapor-vagonaro, poste la marŝon da du mejloj ĝis la farmdomo.

“Ni bagateligis marŝadon en tiu epoko”.

“Mi scias”, mi diris. “Ni ĉiuj marŝis tiam”.

Laŭ ŝia instrukcio mi deviigis sur flankvojeton kaj bremsis.

“Jen ĝi estas”, ŝi sciigis min. “Krucvojo de Turin”.

Mari fikse rigardis tra la fenestro. Mi demandis ĉu ŝi volas eliri, sed ŝi kontentis resti en la aŭto.

“La lasta fojo, kiam mi alvenis, estis ĝuste post la milito estis finiĝinta”.

“Ĉu vi povas memori ĝis 1945?”. Mia memoro svagas pri la pasinteco.

“Jes”. Ŝi torde turniĝis kaj ridetis. Ŝia vico por indulgo.

“Estis la kristnaska ferio kaj mi alvenis je la antaŭkristnaska vespero. Avinjo kaj Avĉjo staris ĉe la sojlo, salutante min per *Come awa ben the hoose* – envenu en la salonon – tamen ili ne aspektis la kutimaj sprituloj. Mi ne estis vizitanta ilin dum pluraj jaroj, do mi opiniis, ke tio ne plaĉis al ili. Mi grimpis la ŝtuparon, kie mi estis kutime dormadanta, por falrestigi mian valizon. Ĝi posedis agrablan etoson kaj estis fenestreto alrigardanta la kokinejon. Avĉjo estis remarŝanta al la domo kun kokino pendanta en la mano. Li ĵus mortigis ĝin”.

Mi grimacis.

“Jes, ne plaĉis al mi spekti lin tiri la kolojn, tamen ni estis bone manĝontaj je la venonta kristnasktago”.

Mari ridis. “Ĉiam troviĝis laodoro de parafino, kiun uzis Avinjo por purigi la linoleumon, aldone tineo-globetoj en la vestoŝranko. Ankoraŭ taglumis, kvankam tiu lumo velkis rapide, kiam mi promenis al la stalo kie Jemi la ĉevalo estis loĝinta. Mi sciis tion, ĉar Avĉjo estis sciiginta min ke li estis mortinta. La kesteto, kiu tenis sukerbuletojn, ankoraŭ troviĝis sur breto. Mi estis donadanta unu al Jemi kaj mem estis manĝanta. Ĉu iuj restas? Jes, kelkaj ankoraŭ estis en la ujo. Mi mordis je unu, sed la gusto nedolĉis”.

Mari spirblovis. Ŝi admonas min se mi nostalgiumas, tamen mi rimarkis larmeton sur ŝia vango.

“Kiam mi foriris de la stalo”, Mari daŭrigis, “Flosi, la ŝafhundo, saltkuris ĝis mi. “Venu, junulino”, mi kriis, kaj ni promenis al la bovinoj. Ne plaĉis al ili Flosi, sed ŝi ne ĝenus iun”.

Ŝi paŭzis, do mi demandis, “Vi diris ke viaj geavoj ne tiom amis vin?”.

“Ne vere. Nur ŝajna malvarmo. Sed tiam mi malgajis pro ŝanĝiĝoj. La domo ŝajnis melankolia kaj, kiam ni manĝis tiun vesperon, ne estis kutime; mankis la feliĉa ŝerc-babilado de mia onklino Ĵesi. Ŝi estis laboranta ĉe alia farmo”.

“Vi diris ke tiu estis la lasta fojo kiam vi vizitis viajn geavojn”.

“Jes”. La voĉo de Mari apenaŭ flustris. “Avinjo suferis pro koronariito kaj mortis pro korkolapso en 1946. Avĉjo devis translokiĝi en foran maljunulejon”.

Mi premis ŝian manon kaj Mari ridetis en miajn okulojn.

“Do ne necesis ke vi ĝeniĝu pri la ŝajna malvarmo al vi”.

“Ne”, diris Mari. “Kaj estis io alia”.

“Je tiu vespero, kiam mi enlitiĝis, mi kuŝis iom antaŭ dormiĝo. Mi aŭdis miajn geavojn venantaj supren. La botoj de Avĉjo falis sur la plankon – jen la unua, jen dua. La muroj estis maldikaj kaj mi apenaŭ aŭdis ilian konversacion. “*Marie's a grand lass* – Mari estas bona junulino”, diris Avinjo. “*Aye, she is that* – jes, ŝi ja estas”, Avĉjo respondis. “*An she'll mak a grand wife tae some lucky lad* – kaj ŝi fariĝos bona edzino por iu bonŝanca junulo””.

Mi premis ŝian manon denove.

“Kaj vi faris tion, junulino. Vi ja faris”.

**Alekso MOLLISON**

# Esperanto Course Available from EAS

Esperanto Condensed Course by *Ed Robertson*

**NEW REVISED EDITION**

A number of booklets comprising more than 180 pages, £10 inc. p&p, presented in a neat wallet together with a free Esperanto pen! This course, now republished in a new edition by the Scottish Esperanto Association, aims to cover the whole of Esperanto's grammar in just six lessons. The course includes the lessons themselves, plus a booklet giving all the vocabulary covered in the course, and another booklet containing background information on the history of Esperanto, a pronunciation guide, the grammar of Esperanto (not just the 16 rules!), a glossary of grammatical terms, and three in-depth discussions on the major grammatical issues of the accusative, the correlatives and word-formation. The course also includes assignments to be submitted by the student. The course also includes tutor assistance and feedback by post. A pronunciation CD is also available for the course, priced £5, with texts spoken by David Kelso and Mia Casey.

- Please send me 1 copy of the Esperanto Condensed Course. (£10)
- Please send me 1 copy of the Condensed Course Companion CD. (£5)
- I have enclosed a cheque for £5/£10/£15 (delete as appropriate).

Please make payable to Scottish Esperanto Association.

Name .....

Address .....

.....

Telephone .....

**Send to:**

Scottish Esperanto Association, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP